WIKIPEDIA

Domego de la Bona Ripozo

La **Domego de la Bona Ripozo**, en hispana *Casón del Buen Retiro*, estas unu el la du unikaj konstruaĵoj kiuj survivis al la detruo de la Palaco de la Bona Ripozo, el kiu ĝi prenas sian nomon, en Madrido (Hispanio). Konstruita de Alonso Carbonell en 1637 ĝi estis dezajnita dekomence kiel spaco por dancejo de la Kortego de Filipo la 4-a[1]

Ekde 1971 estas unu el la konstruaĵoj kiuj kunformas la komplekson de la Muzeo Prado, kaj dum jardekoj ĝi gastigis ties kolektojn de pentrarto de la 19a jarcento (ĉirkaŭ 3.000 pentraĵoj) tiel kiel la *Gerniko* de Picasso. Tiu fama pentraĵo translokiĝis al la Muzeo Reina Sofía en 1992, kaj la Domego, post jaroj de riparado, malfermiĝis kiel Centro por Studoj en 2009, dum la kolektoj de la 19a jarcento relokiĝis en la ĉefa sidejo de Prado danke al la ampleksigo fare de Rafael Moneo.

Vido de la orienta fasado de la Domego de la Bona Ripozo ekde la Ĝardenoj de la Ripozo.

Notoj

1. ↑ Rosario Mariblanca, (2008), *"Historia del Buen Retiro"*, Madrid, eld. La Librería. Albardonedo Freire, A., "Una nueva copia de José del Castillo de los desaparecidos frescos de Luca Giordano en el Casón del Retiro, de Madrid", en *Laboratorio de Arte*, nº 20, 2007, Universidad de Sevilla, http://institucional.us.es/revistas/arte/20/14%20Albardonero.pdf

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Domego_de_la_Bona_Ripozo&oldid=6744161"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:36, 3 okt. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.